nalist vid en stor svensk tid-
ning och en av de ansvariga
inom SEF. Namnen är i detta
sammanhang ointressanta.
Brevet är något förkortade
och på sina håll ändrade, för
att de ska tjäna som exempel
för argumentering om esper-
anto. Först brevet från jour-
nalisten:

”

Tack för ert brev med upplys-
ningar om esperanto.

Jag klarar mig fram någor-
lunda hyggligt världen över
med engelska, tyska, franska
och spanska. Vad har jag då
för nytta av esperanto? Om
jag står vilsen på en gata i
Hongkong, kan jag då fråga
någon om vägen på esperan-
to?

Jag är nu inte alls emot eller
ointresserad av esperanto.
Tvärtom. Jag skulle gärna vilja
lära mig språket. Men jag
skulle gärna vilja ha mer
övertygande bevis om att det
verkligen behövs och att den
person, som betalar den icke
ringa kursavgiften, faktiskt har
nytta av denna kostnad och
lärdomsmöda.

Den praktiska frågan är
alltså: Kan jag i vilket land som
helst ta mig fram på gatan och
i affärer och i olika situationer,
flygplatser, båt-, buss- och
tågterminaler, restauranger
m.m. klara mig på esperanto?
Eller måste jag liksom vara
medlem i en internationell
klubb och kalla på hjälp hos
”klubben” på orten? Jag är
fullt medveten om att ett
internationellt språk vore en
välsignelse, men har esperan-
to, efter alla dessa år, någon
praktisk betydelse i världen
idag? ”

Vad svarar man på ett sådant
brev? Det räcker inte med ett
stencilerat svar: 'Varsågod lite
trycksaker'. Det blev ett person-
ligt brev med helt person-

liga argument. Här kommer
delar av det:

”

Du kan nog själv svara på de
frågor som du ställt i brevet:
du måste ha en otrolig tur om
du ska hitta en esperantotal-
ande på gatan i Hongkong.
Helt omöjligt är det inte, men
i en engelsk koloni är det
betydligt lättare att hitta en
som talar engelska. Men har
du stått på en gata i Aten, 200
— 300 meter från botaniska
trädgården, och försökt få
reda på var den låg? Det har
jag. Och det hjälpte inte att
kunna engelska, tyska, fran-
ska, spanska. Inte esperanto
heller; men det försökte jag
inte ens. I Paris måste du
kunna franska, om du ska få ut
något av din vistelse där. Det
har du kanske märkt själv.

I somras var jag i Bulgarien.
Där var jag tvungen att be om
hjälp för att beställa ett tele-
fonsamtal. Flickan i växeln
vägrade att befatta sig med
engelska, och det på ett av
Bulgariens bästa hotell.

Jag tar med dessa exempel
bara för att visa, att språksitua-
tionen i världen inte är så
enkel som de svenska skol-
myndigheterna vill göra gäl-
lande.

Du med dina språkkunskaper
har förmodligen inget
större behov av esperanto.
Dina språk räcker till för att du
ska klara dig hyggligt i alla de
situationer som du nämner i
ditt brev, och flera andra till.
Detsamma gäller nog mig
också. Men hur många är det
som har samma privilegium
att kunna språk? Åtskilliga i
Sverige, men i övrigt? Redan i
Sydeuropa har du en annan
situation. I Östeuropa hittar
du folk som kan ryska — med
deras kunskaper i västerländska
språk är det lite sämre ställt.
Hur det är utanför Europa vet
du förmodligen bättre själv.
Där har du de europeiska
språken i officiell ställning
som en kvarleva från kolonial-
tiden — i många länder på väg
ut.

Esperanto är en idé; en idé
att det går att umgås interna-
tionellt på ett enklare sätt.
Som alla idéer behöver det
lite tid för att slå igenom. Du

kan inte ställa esperanto och, t
ex, engelska på samma nivå.
Engelska har i ca 400 — 500 år
försökt att bli internationellt
antaget, esperanto har bara
funnits i 90 år. Bakom engel-
ska har du hela Englands och
USAs maktapparat, bakom
esperanto enskilda personer.
Vi tycker att vi lyckats rätt så
bra med att föra fram vår idé
— men visst har vi långt kvar!

Det här låter ungefär som:
vänta och se. Det ska du inte!
Du kommer att ha glädje av
esperanto, mest på det per-
sonliga planet. Det låter som
en gjord fras, men jag menar
det. Man kommer genom
esperanto mycket närmare
människorna i andra länder;
kanske just därför att det inte
går att vända sig till vem som

helst på gatan och be om
hjälp. Och det där med ”med-
lem i en internationell klubb”
är väl en praktisk lösning, eller
hur? ”

Detta var alltså svaret från en
av de ansvariga i SEF. Vad
tycker du om detta svar? Hur
skulle du själv ha svarat om
brevet kommit till din adress i
stället?

Det finns säkert hundra sätt
att svara — låt oss för en gångs
skull göra ett försök att svara
på olika sätt! Dessa svar får
samtidigt bli en övning i
argumentering för esperanto.
Läs ordentligt igenom vad
journalisten vill få reda på och
svara på *hans* hennes frågor.

UEA BEHÖVER DIG I ÅR OCKSÅ

Var du med i UEA under 1980? Var med i år med! Du
betalar

155 kr om du är *MA*, dvs medlem med årsbok och tidning
Esperanto

62 kr om du är *MJ*, dvs medlem med årsbok.
Du kan även göra ett extra tillägg till din avgift och stödjer
UEAs arbete.

310 kr betalar du extra om du vill stödja UEA. Då blir du
medlem i *Societo Zamenhof*.

Du betalar till postgiro **14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet,
Specialkonto. För förfrågningar ring till Asta Schaedel, V.
Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040 - 91 63 09.

Prenumerera

Prenumerera på esperantotidningar! Utveckla ditt
språk, följ dina intressen i fackpressen! Espe-
rantoförbundet hjälper dig att prenumerera. Välj
någon eller flera av nedanstående tidningar:

Heroldo de Esperanto (18 nr per år)	63 kr
Kontakto (för ungdom, 4 nr per år)	46,50
Oomoto (religiös)	22 kr
Sennaciulo (varje månad)	85 kr
Literatura foiro	38 kr
Kulturaĵ kajeroj	35 kr
Norvega esperantisto	16 kr
El popola Ĉinio, 1 år	25 kr
2 år	45 kr
3 år	65 kr

Du sätter in prenumerationsavgiften på postgiro
59 67 68-2, Esperantoförbundets Prenumerationskonto
så sköter vi resten. Enkelt, eller hur? Men gör
det snabbt, om du vill ha alla årets nummer!

ESPERANTOFÖRBLAGET

Kelkaj paĝoj da irlanda humuro

Se oni nuntempe mencias Irlandon, kredeble multaj homoj pensos unue pri sufero: pri la angoro, timo detruo kaj doloro, kiujn kreas fanatika malplimulto en Norda Irlando. Kiel en ĉiuj situacioj de politika streĉiteco estas grave memori, ke vasta plimulto, en ĉiuj landoj, konsistas el homoj pli-malpli bonkoraj kaj simpatiaj, kiuj almenaŭ ne deziras suferigi aliajn.

Multaj grandaj anglalingvaj verkistoj, inter ili Bernard Shaw, James Joyce kaj W. B. Yeats, estis irlandanoj. En la nuntempo estas eble ankaŭ bone memori, ke ekzistas granda tradicio de irlanda

humuro, de ŝercoj, fantazioj, diversaj ĉarmaj atentigoj pri la ridinda flanko de nia homa vivado.

Humuro pritraktas neracieron, sed ĝuste tial estas granda helpilo al racio kaj modero kaj granda konsolo al ni homoj. Do, jen bela specimeno de irlanda humuro. La legendo pri la kato estas parteto, sufiĉe memstara, el fama irlanda humura romano Handy Andy (ni diru eble Lerta Alberto la adjektivo estas ironia) de Samuel Lover, kiu restas sufiĉe leginda. La romano aperis en 1842. Kompreneble la kultura nivelo de Irlando estas nun pli alta!

LA MIRINDA LEGENDO PRI LA KATO DE TOĈJO CONNOR

(En irlanda trinkejo Murphy Murtough, irlanda ŝercemulo, rakontas ne tre kredindan historion kun la malhelpo de siaj kuntrinkantoj.)

"Troviĝis grenisto en ĉi tiu regiono, sciu, sinjoro, nomita Toĉjo Connor, kaj li posedis katon egalvaloran al iu ajn dekduo da ratkaptiloj, kaj li fieris pri la besto kaj prave: ŝi valoris sian propran pezon da oro al li, protektante liajn farun-sakojn kontraŭ rata kaj musa priŝtelado, ĉar Toĉjo grandskale komercadis pri greno kaj influis la altiĝon kaj malaltiĝon de ties prezo per siaj dek du sakoj, kiujn li rezervis kune aŭ vendis kune laŭ sia portempa inklino al libera komerco aŭ monopolo. Nu, vere iam Toĉjo serioze pripensis la eblecon peti de la registaro soldataron, kiu protektos lian grenejon, dum minacis malsato."

"Tal tal sinjoro," diris la praktika malgrandulo, "kvazaŭ dek du sakoj povus eĉ ete signifi en tuta graflando — tal tal!"

"Nu, do, sinjoro," diris Murphy, "ne mi kulpas, se vi ne kredas! Sed tio, kion mi al vi rakontas, estas vera; kaj mi petas, ne interrompu min, eĉ se vi ne kredas. Antaŭ la fino de la rakontado vi aŭdos pri

aferoj eĉ pli mirindaj; kaj memoru, ke vi estas fremdulo ĉi tie kaj tute ne havas ideon pri la eksterordinaraj aferoj, fizikaj, metafizikaj kaj magiaj, kiuj konsistigas la idiosinkrazion de la pasterala antaŭdestino."

La malgrandulo ne komprenis la lastan frazon de Murphy kaj Murphy mem ne pli bone komprenis. Sed silentiginte la malgrandulon per grandaj vortoj li daŭrigis:

"Tiu ĉi kato, nepre sciu, sinjoro, estis tre kara drolotbesto kaj tiel komprenis ĉion, ke Toĉjo ĵuradis, ke ŝi preskaŭ egalas al kristano, nur paroli ne povas, kaj ŝi tiel inteligente rigardis lin, ke li plene certis, ke la kato komprenas ĉiun vorton, kiun li diras al ŝi. Nu, ŝi do kutimis sidi apud li, dum li matenmanĝis ĉiumatene kaj la elokventa rektigo de ŝia vosto, kiam ŝi frotis sin kontraŭ lia kruro, diris: 'Donu al mi lakton, Toĉjo Connor', klare kiel presaĵo; kaj la riĉeco de ŝia ronrono poste esprimis dankegon preter lingva esprimeblo.

Nu, unu matenon do Toĉjo intencis iri al la plej proksima urbo, al la foiro, kaj li promesis al sia edzino, ke li portos hejmen ŝuojn por la infanoj, el la prezo de la greno. Kaj jen vere, antaŭ ol li eksidis por

matenmanĝi, Toĉjo mezuris la piedojn de la infanoj tranĉante noĉojn sur bastoneto; kaj la edzino tiel insistadis, ke li prizorgu 'netan taŭgecon' por la 'belaj piedetoj' de Vilĉjo, ke Toĉjo, tro penante noĉi kiel eble plej proksime, fortranĉis piedfingron de la knabeto. Tio malagordis la familian harmonion kaj Toĉjo devis matenmanĝi sola, dum la patrino penadis rebonigi Vilĉjon, nu, mallonge, fingre repiedi lian piedfingreton.

Nu, do, sinjoro, dum Toĉjo mezuris por ŝuoj, la kato rigardadis lin kun tiu lumeco en la okuloj, kiu estas distinga trajto de la kato gento; kaj kiam Toĉjo eksidis por matenmanĝi, la kato frotis sin kontraŭ li pli vigle ol kutime. Sed Toĉjo, konfuzita inter sia atendita profito per greno kaj la certa malprofito ĉe la infana piedfingro, daŭre malatentis ŝin, ĝis la kato kun ia miaŭega grumblo regalas Toĉjon per ungofrapo, kiu plene penetris lian ledan pantalonon kaj iom pluen.

'Oj!' ekkriis Toĉjo eksaltante kaj mane ekfrotante la vunditan korpoparton, 'je umo kaj io, vi ŝprucigis sangon el mi,' diris Toĉjo, 'vi fia diablo — huŝ! ek for!' li diris provante piedbati ŝin. Tiam la kato rigardis lin riproĉe kaj ŝiaj okuloj lumegis kiel du kaleŝaj lampoj tra nebulo. Kaj jen, sinjoro, la kato kun mistera 'mi-aŭ' fiksas Toĉjon per tre penetra rigardo kaj klare prononcis lian nomon.

Toĉjo sentis ĉiun haron sur la kapo rigida kiel anso de akvopumpilo; kaj apenaŭ kredante siajn proprajn orelojn li reciproke fiksigardis la katon, kiu daŭrigis per voĉo iom pernazata:

'Toĉjo Connor,' ŝi diris.

'La Disinjoro bonfaru al mi!' diris Toĉjo, 'se ŝi ne estas parolanta!'

'Toĉjo Connor,' ŝi ripetis.

'Jes, sinjoro,' diris Toĉjo.

'Venu ĉi tien,' ŝi diris flustre, 'mi volas paroli kun vi, Toĉjo,' ŝi diris, 'iomete private,' ŝi diris — levigis side kaj per piedeta gesto vokis lin eksteren kun okulumo kaj kaposkueto, kiujn ĉapelistino ne povus superi.

Nu, kiel vi povos kredi, Toĉjo ne sciis, ĉu li staras sur la kapo aŭ la kalkanoj, sed li sekvis la katon kaj ek! ŝi foriris kaj eksidis duonkaŝite ĉe la rando de la kampeto malantaŭ la domo. Kaj kiam li venis laŭ la angulo ŝi ree levis piedeton kaj tenis ĝin antaŭ sia buŝo, kvazaŭ por diri 'zorgu, Toĉjo'. Nu, diable,

nenion Toĉjo kapablis entute diri pro timego, do li proksimiĝis al la kato kaj ŝi diris:

'Toĉjo,' ŝi diris, 'mi tre estimas vin kaj estas io, kion mi devas sciigi al vi, ĉar vi perdas vian reputacion inter la najbaroj,' ŝi diris, 'per via miskonduto,' ŝi diris, 'kaj estas pro mia estimo al vi, ke mi sentas devon averti vin,' ŝi diris.

'Dankon, sinjorino,' diris Toĉjo.

'Vi iros al la urbo,' ŝi diris, 'por aĉeti ŝuojn por la infanoj,' ŝi diris, 'kaj neniam pensis, ke vi aĉetu por mi paron.'

'Por vil!'

'Jes, por mi, Toĉjo Connor,' ŝi diris, 'kaj la najbaroj miras, ĉar deca homo kiel vi permesas, ke via kato promenu sur la kamparo nudpieda.'

'Ĉu nun decas, ke kato portu ŝuojn?' diris Toĉjo.

'Kial ne?' ŝi diris. 'Ĉu ĉevaloj ne portas ŝuojn? Kaj mi esperas, ke mi havas pli belan piedon ol ĉevalo,' ŝi diris kapskuante.

'Je mia fido, ŝi parolas kiel virino — tiel fiera pri siaj piedoj,' diris Toĉjo al si mem mirante, kiel vi povos kredi, sed ĉiam ŝajnigante, ke li trovas nenion neordinara. Li do daŭre oratoris kaj li diris: 'Jes ja, sinjorino, estas vere, ke ĉevaloj portas ŝuojn, sed racio tion diktas, sinjorino. Pensu pri la sufero de iliaj piedoj sur malmolaj vojoj.'

'Kaj kiel vi scias, kiom da suferoj miaj piedoj devas toleri?' diris la kato, tre akrate.

'Sed, sinjorino,' diris Toĉjo, 'vere mi ne komprenas, kiel estas eble fiksi ŝuon sur vin.'

'Lasu tion al mi,' diris la kato.

'Ĉu iu iam fiksas juglandŝeojn sur vin, kanjo?' demandis Toĉjo kun rideto.

'Ne parolu malrespekte, Toĉjo Connor,' diris la kato kun malrideto.

'Mi petas vian pardonon, sinjorino,' li diris, 'sed pri tiuj ĉevaloj, kiuj portas ŝuojn — vi scias, ke iliaj ŝuoj estas fiksitaj per najloj — kiel viaj estos fiksitaj?'

'Ho, vi stulta ŝtelisto!' ŝi diris, 'ĉu mi ne havas ilogantajn proprajn najlojn?' kaj ŝi batis lin per siaj ungoj, tiel ke li ekmuĝis.

'Oj! murdon!' li kriis.

'Nu, ne komitatu plu, sinjoro Connor,' diris la kato, 'nun ekiru kaj aĉetu miajn ŝuojn.'

'Ŝiroj kaj vundoj!' diris Toĉjo, 'kiel mi statos, se mi devos aĉeti ŝuojn por miaj katoj? Vi ja pliigas vian fami-

lion kvarfoje ĉiujare kaj vi naskas ĉiujfoje ses aŭ sep katidojn,' li diris. 'Kaj tiam vi ĉiuj bezonos po du parojn — ho ve! ho ve! ŝuledo bankrotigos min.'

'Ne plu sensencadu,' diris la kato. 'Ne staru ĉi tie sub la heĝo parolante, aŭ ni perdos niajn reputaciojn; ĉar mi rimarkis, ke via edzino estas ĵaluza, Toĉjo.'

'Je mia animo, jes ja,' diris Toĉjo kun memkontenta ride-to.

'Des pli malsaĝe,' diris la kato, 'ĉar je mia konscienco, Toĉjo, vi estas malbela, kvazaŭ speciale antaŭmendita!'

Dirinte tiujn vortojn la kato forkuris lasante Toĉjon fulmfrapita. Li diris nenion al la familio por ne timigi ilin kaj ekiris al la urbo, kiel li ŝajngis — ĉar li rimarkis, ke la kato lin rigardas tra truon en la heĝo. Sed kiam li alvenis al vojokurbo li ne pli ol la diablo atentis pri la foiro aŭ bona aŭ malbona prezo, sed tuj iris al bienulo Ĝenunin, la loka juĝisto, por ĵurdeklari akuzon kontraŭ la kato.

"Tal tal sensencaĵo!" interrompis la malgrandulo, kiu ĝis tiam aŭskultis Murtoough kun mieno de miksita miro kaj malestimo, dum la ceteraj kuntrinkantoj volonte cedis la gvidrimenojn al absurdo kaj ĝuis la legendon de Murtoough kaj la pli ridindan prudenton de la malgrandulo.

"Ne interrompu lin, Goggins," diris sinjoro Wiggins.

"Kiel vi povas aŭskulti tian sensencaĵon?" respondis Goggins. "Ĵurdeklari akuzojn kontraŭ kato, ja! tal ta!"

"Kara sinjoro," diris Murtoough, "Memoru, ke temas pri ferakonto kaj ke nia tuta ĉirkaŭaĵo estas plena de sorĉado. Kiel mi ĵus diris al vi, Toĉjo foriris por ĵurdeklari akuzon."

"Jes, jes!" kriis ĉiuj, escepte de Goggins, "daŭrigu la rakonton."

"Kaj kiam Toĉjo devis raporti pri la matenaj eventoj pro kiuj li vizitis bienulon Ĝenunin, lia cerbo estis tiel konfuzita inter la greno kaj la kato kaj la piedfingro de la infano, ke lia rakonto estis tre konfuza.

'Komencu vian raporton de la komenco,' diris la juĝisto al Toĉjo.

'Nu, via moŝto,' diris Toĉjo, 'mi intencis iri al la foiro ĉi matene por vendi la grenon de la infano. Pardonu min, miajn proprajn piedfingrojn, mi intencis iri, sinjoro.'

'Vendi viajn piedfingrojn!' diris la bienulo.

'Ne, sinjoro, mi intencis iri: porti la katon al la foiro —'

'Porti katon al foiro!' diris la bienulo. 'Viro, vi estas ebria.'

'Ne, via moŝto, nur iomete konfuzita; ĉar kiam la piedfingroj komencis paroli al mi — mi intencas iri: la kato — mi estis pure perpleksita —'

'La kato parolis al vi!' kriis la bienulo. 'Hu! pli malbone ol antaŭe. Toĉjo, vi estas ebria.'

'Ne, via moŝto, estas pro la kato, ke mi venas por paroli al vi.'

'Mi suspektas, ke estas pro duonlitro da viskio, Toĉjo —'

'Je mia honorvorto, via moŝto, estas nur pro la kato.' Sekve Toĉjo rakontis la tutan aferon kaj la bienulo tute leĝe kaj taŭge miregis. Ĝuste tiu-momente la episkopo de la diocezo kaj la pastro de la paroĥo hazarde vizitis la bienulon kaj aŭdis la raporton. La episkopo kaj la pastro vigle disputadis dum du horoj pri la temo. La episkopo insistis, ke ŝi devas esti sorĉistino; la pastro neis kaj insistis, ke ŝi estas nur sorĉita. Kaj pri tiu temo ili poste petis konsilon de la primaso, kiu sendis la demandon al la kardinalaro en Romo. Sed la papo rifuzis *el-kat-edri* dirante, ke li jam sidas sufiĉe en la *bule-ono*.

'Dume kion mi faru pri la kato?' demandis Ĝenunin.

'Brulmortigu ŝin,' diris la episkopo. 'Ŝi estas sorĉistino.' 'Nur sorĉita,' diris la pastro, 'kaj la eklezia kortumo insistas, ke —'

'Ho, al kukolo la eklezia kortumo!' kriis la juĝisto. 'Mi rajtas procedi nur laŭ la ŝtataj leĝoj,' kaj do li deprenis ĉiujn librojn pri juro, kiujn li posedis, kaj traserĉis en la leĝoj ek de Elizabeto la Unua kaj li trovis, ke oni faris leĝojn kontraŭ ĉio en Irlando, sed *ne kontraŭ kato*. Nenio elfalis, escepte de kato, kiu ne inkluzivigis en la amplekso de iu ajn leĝo: *nur la katoj eskapis*.

'Nu, estas la leĝo pri fremduloj,' diris la juĝisto, 'kaj eble la kato estas franca spiono sub kata masko.'

'Ŝi parolas kiel franca spiono, vere ja,' diris Toĉjo. 'Kaj mi memoras, ke ŝi estis for de la domo dum la tuta lasta spiona merkredo.'

'Jen suspektinde,' diris la bienulo, 'sed pravi ŝin kulpa povus esti malfacile. Sed mi havas freŝan ideon,' diris Ĝenunin.

'Je mia fido, ĝi ne longe restos freŝa, pro la varma vetero,' diris Toĉjo, 'do pli bone, ke via moŝto uzu ĝin tuj.'

'Bone,' diris Ĝenunin. 'Ni venigos ŝin en la amplekson de la leĝoj pri ĉasbestoj; ni ĉasos ŝin,' li diris.

'Ho! elegantel!' Toĉjo diris. 'Ŝi havigos al ni belan ĉasekskurson.'

'Renkontu nin ĉe la vojo-kruco,' diris la bienulo, 'morgaŭ matene kaj mi aranĝos, ke la hundoj estu pretaj.'

Toĉjo do hejmeniris kaj li turmentis sian cerbon pri preteksto per kiu li povos kontentigi la katon pri la malĉeesto de la ŝuoj. Finfine li elmartelis ideon, ĝuste tiam, kiam li vidis ŝin jam troti por renkonti lin, unu kilometron antaŭ la hejmalveno.

'Kie estas la ŝuoj, Toĉjo?' ŝi diris.

'Mi ne havas ilin hodiaŭ, sinjorino,' li diris.

'Ĉu tiel vi plenumas vian promeson, Toĉjo?' ŝi diris. 'Jen kiel estas, Toĉjo: mi elŝiros la okulojn de la infanoj, se vi ne havigos al mi ŝuojn.'

'Ĉit, ĉit!' diris Toĉjo, preskaŭ morta pro timo pri la okuloj de la infanoj. 'Ne furiozu, kanjo. La ŝuisto diris, ke li havas eĉ ne unu ŝuon en la butikoj taŭgan por vi, nek ŝuformilon, sur kiu li povus fari taŭgan por vi. Li diras, ke mi devas venigi vin en la urbon, por ke li ĝuste mezuru vin.'

'Kaj kiam mi iru?' diris la kato minace mienante.

'Morgaŭ,' diris Toĉjo.

'Bone, ke vi tion diris, Toĉjo,' diris la kato, 'aŭ, je la diablo, mi ne lasus unu okulon ĉe via familio ĉi nokte,' — kaj ŝi saltis for.

Toĉjo tremis pro ŝia malica rigardo.

'Memoru!' ŝi diris tra la heĝo kun akra miaŭego.

'Ne dubu,' diris Toĉjo.

En la vero matene, kiam la koko kriis, la kato estis preta, lekante sin neta kiel nova pinglo por iri al la urbo, kaj jen venis Toĉjo kun sako sub la brako kaj la kato malantaŭ si.

'Nu, saltu en ĉi tiun sakon kaj mi portos vin en la urbon,' diris Toĉjo malfermante la sakon.

'Mi povas ja piediri kun vi,' diris la kato.

'Ho, tio ne decus,' diris Toĉjo. 'La urbanoj estas scivolemaj kaj kalumniemaj kaj certe malbelaj diroj komenciĝus, se oni vidus min kun kata akompananto. Hundo estas natura kunulo al viro, sed katoj ne estas per racio regataj.'

Do la kato, perceptante, ke disputado ne helpas, saltis en la sakon kaj Toĉjo ekiris al la vojokruco kun la sako sur la ŝultro. Kaj li alvenis tute senkulpaŝajne al la angulo, kie

la bienulo kaj lia ĉasisto kaj la hundoj kaj aro da homoj atendis. Jen subite venis la bienulo, kvazaŭ ĉio estus nur hazardo.

'Dio vin benu, Toĉjo,' li diris.

'Dio vin benu bone, sinjoro,' diris Toĉjo.

'Kio estas tiu sako, kiun vi portas surdorse?' diris la bienulo.

'Ho, nenio grava, sinjoro,' diris Toĉjo grimacante senĉese, kvazaŭ por signi 'mi havas ŝin sekura'.

'Ho, mi opinias, ke io estas en la sako,' diris la bienulo, 'kaj vi devas lasi min rigardi ĝin.'

'Se vi perfidos min, Toĉjo Connor,' diris la kato mallau-te, 'je amo kaj aĵo, mi neniam plu parolos al vi!'

'Je mia honoro, sinjoro,' diris Toĉjo palpebrumante kaj per la dikfingro indikante la sakon, 'mi havas nenion en ĝi.'

'Mi rimarkis malaperemon ĉe miaj terpomoj lastatempe,' diris la bienulo, 'kaj mi deziras iom rigardi en vian sakon,' li diris.

'Ĉu vi dubas pri mia karaktero?' demandis Toĉjo ŝajngante sin ofendita.

'Toĉjo, je via animo!' diris la voĉo el la sako. 'Se vi *ellasos la katon el la sako, mi murdos vin*.'

'Honestulo ne protestus kontraŭ priserĉado,' diris la bienulo, 'kaj mi insistas,' li diris, kaptante la sakon, dum Toĉjo ŝajngis, ke li rezistas. Sed ho, juvelo mia! Post malpli ol du minutoj ili elskuis la katon el la sako, kaj ek! ŝi forkuregis kun vosto granda kiel balailo. Kaj la bienulo, kun tondra jen ĉasul-krio post ŝi, instigis la hundojn postkuriri; kaj ili forrapidis vivovete.

Neniam oni vidis tian kuradon: la kato celis tremantan ŝlimejon, la plej neologatan parton de la tuta kamparo, kaj tie ĉiuj rajdantoj defalis, escepte de la ĉasisto, kiu havis ĉevalon palmopiedan, speciale por molaj lokoj, kaj de la paströ, kies ĉevalo povis iri ien ajn pro la pastra beno. Kaj kredu min, la ĉasisto kaj lia pastra moŝto daŭrigis la ĉason kiel vakso alfiksiĝas. Ĝuste kiam la kato atingis la randon de la ŝlimejo, ili vidis ŝin tordi sin, ĉar la unua hundo kaptis ŝin kaj mordis ŝin ĉe la flanko. Ŝi tamen daŭre kuradis kaj bone antaŭ ili ĝis malnova argila kabano meze de la ŝlimejo. Tie ili vidis ŝin ensalti tra la fenestro; unu minuton poste venis la hundoj kaj ĉirkaŭstaris la kabanon kun la

plej terura hurlado, kiun vi iam ajn aŭdis. La ĉasisto deĉevaliĝis kaj iris en la kabanon por elpeli la katon, kiam kion li vidis? Maljunulinaĉon, kiu kuŝis sur lito en angulo!
'Ĉu vi vidis katon enveni?' li demandis.

'Ho, mi ne...e...e...e!' blekis la maljunulinaĉo per tremanta voĉo. 'Estas nenia kato ĉi tie.'
'Jelp! jelp! jelp!' kriis la hundoj ekstere.

'Ho, ne enlasu la hundojn,' diris la maljunulinaĉo, 'ho, mi...aŭ, aŭ, aŭ!' Kaj la ĉasisto vidis, ke sub la litkovrilo ŝiaj okuloj brilas kiel tiuj de kato.

'Ho, jeni!' diris la ĉasisto fortirante la kovrilon — kaj kion li vidis? La flankon de la maljunulinaĉo, tute sang-

tremпита.

'Hej, hej! Vi maljuna diabli-no! Ĉu estas vi, maljuna kato!' li diris malfermante la pordon.

La hundoj alkuris — la maljunulinaĉo eksaltis — ŝi transformiĝis en katon antaŭ iliaj okuloj. Ŝi saltis denove eksteren tra la fenestro kaj ree penis forkuri. Sed ŝi ne sukcesis eskapi kaj la hundoj formangiĝis ŝin, antaŭ ol vi povus diri 'Joĉjo Robinson'. Sed la plej stranga parto de ĉi tiu eksterordinara historio, sinjoroj, estas, ke la hundaro ekde tiu tago estis plene difektita, ĉar manĝinte la sorĉitan katon poste ili ĉasis, diable! — nur musojn.'

Tradukis Marjorie Boulton

PERSONE

"Elstara kaj male en la Esperanto-Movado"

Mi ne scias, kiu verkis la leteron, kiun mi ricevis kopie iun tagon kune kun kopioj de kelkaj artikoloj pri esperanto. Tiu, kiu sendis la kopiojn, asertis, ke li siavice ricevis ĝin de iu alia. Nu, ne gravas, kiu estas la aŭtoro. Mi tre bonvenigis tiun leteron, ĉar mi promesis al la redaktoro de *La Espero* por ĉiu numero liveri ion, kion li nomas 'kozerio', sed mia fantazio (se mi entute havas ian) strikis ĉifoje. Kaj estis nur la dua fojo! La kopio de tiu letero diris la jenon:

"Kiam mi ankoraŭ estis Juna kaj Verda en mia laboro, mi havis diskuton kun tiama Ĉefo pri liaj broŝurtekstoj. Mi ne komprenis, kiujn Principojn li sekvas rilate majuskligo de vortoj. Li havas, li klarigis, la Principon majuskligi Gravajn Vortojn: Banko, Entrepreno, Industrio k.s. ĉiam aperu per majuskloj, ĉar ili estas Gravaj.

Mi rimarkas, ke revuo Esperanto ankaŭ sekvas tiun

saĝan principon de mia eksa Ĉefo. El la Raporto de la Estraro (majo 80) kaj la Raporto pri la Kongreso (septembro 80) mi lernas, kio estas Elstara en la Esperanto-Movado. Komitato kaj Estraro estas memklaraj Kandidatoj, sed mi kun ĝojo rimarkas, ke ankaŭ Raporto, Voĉdono, Kongresejo, Libroservo kaj Aliaj elstaras. Mi tamen trovas, ke oni ne estas tute konsekvenca: en la Kongresejo el-staris la Scenejo, kiu ne ricevis Majusklon, dum ricevis ĝin Flago, kiu nur pendis.

Mi kredis, ke Esperanto, simpla Lingvo, havas simplan regulon pri majuskligo: la Majusklon ricevas Propraj Nomoj kaj Vortoj, per kiuj komenciĝas nova frazo. Mi vidas, ke mi eraris kaj ke Estraro ne Elstaras, se ĝi ne ricevas Majusklon.

Nun mi pardonpetas al ĉiuj, Estraroj, Kongresejoj kaj Flagoj, se mi iam ofendis ilin pro tio, ke mi minusklis ilin. Ne estis la Intenco, sed nura nescio miaflanke. Mi promesas Pliboniĝi."

Tie finiĝas la letero, kiu ne havas subskribon. Mi komprenas, ke ĝi verŝajne estas verkita por revuo *Esperanto* de UEA, sed mi ne vidis ĝin en tiu gazeto. Aŭ ĉu eble mi eraras?

Kiel ajn, ĉaŭ al vi ĉiuj!

Eta Mi

(redakcia noto: La aŭtoro de tiu letero estas konata al ni.)

TABULO

52 gradoj en la ombro - tia varmego povas esti en Tunizio! Pensu pri tio, kiam la frosto mordas vian nazon, kaj sendu leteron (Ne nur pri vetero) aŭ bildkarton al la 30-jara flegisto Abderrahman Grine, Zaouit-El-Arabe, Degache, Tunizio.

El Irano venas pli kaj pli da korespondpetoj. Kun gejunuloj ŝatus korespondi Reza Khashaiar, Ave-Sattarkhan, St-Shadmehr, Alley-Golhar no 6, Tehran, Irano.

22-jara studento de agronomio el Ĉeĥoslovakio, kun kutimaj intereso, serĉas korespondamikojn. Roman Bartl, Pod kaštany 14, CS-616 00 BRNO, Ĉeĥoslovakio.

Se vi estas ĉirkaŭ 50-jara, daŭrigu legi ĉi tiun anonceteton! Janina Rosiek el Gdańsk atendas leteron de vi. Ŝi estas instruistino, kiu lernis esperanton dum iom pli ol duona jaro - kaj skribas en ĝi perfekte (mi ja legis ŝian unuan leteron eksterlanden). Ne lasu ŝin atendi vane. La adreso: Janina Rosiek, ul. Krzywoustego 29 A.m. 1, PL-80-360 Gdańsk, Pollando.

Kun Milada vi certe povos korespondi pri interesaj temoj! Akupunkturo, jogo, homaj rilatoj, tablotenis (pri kiu ŝi ŝajnas esti tre sperta) kaj geografiaj bildkartoj, el kiuj ŝi jam havas preskaŭ 3000, estas la temoj, kiujn ŝi proponas. Ni aldonu, ke ŝi estas 23-jara kaj studas medicinon. Ek! Milada Hacuřová, 775 Olomouc, Ĉeĥoslovakio. La adreso ŝajnas esti nekompleta, sed tian ŝi indikis al ni.

Japana dommastrino kun du gefiloj, 12 kaj 13 jaraĝaj, volonte korespondos kun gesvedoj. La plej ŝatata okupo estas pentrado kaj desegnado, sed ankaŭ pri diverslandaj kutimoj, kostumoj kaj rakontoj ŝi interesiĝas. Skribu al s-ino Yaeko Ohiwane, 3, Shomei-so, 2-61, Oshimoto-c, Nakagawa-k, Nagoya-s, 454 Japanio.

Respondon garantias Dariusz, 18-jara junulo kiu studis la lingvon jam tri jarojn kaj nun volas korespondi kun gejunuloj en Svedio. Skribu tuj al: Dariusz Lis, ul. Wiejska 5/66, PL-14-500 Braniewo, Pollando.


Ĉu laboristo aŭ ministro - tio ne gravas al 56jara fraŭla segisto ĉeĥa. Li volonte korespondas kun kiu ajn kaj pri kio ajn. Skribu al s-ro Ladislav Kralovec, Ĉeska Kubice nro 77, CS-34532, Ĉeĥoslovakio.

39-jara Mirko estas elektroteknikisto kaj li atendas leterojn el tuta Skandinavio post ĉi tiu anonceto. Do, skribu! Lia adreso estas: Mirko Zlatković, Djure Kiša 36, YU-22240 Šid, Jugosl.

Äntligen! Det tycker red. med!

Varsågod! Här kommer ett dubbelnummer av *La Espero* på 16 sidor. Du får det i mitten av januari, trots att det står november/december på första sidan. Orsakerna till denna försening är flera.

Flyttningen av SEF till ny lokal förorsakade en försening på ett par veckor minst. När sedan redaktören kom igång och ville förfärdiga de två återstående numren kunde han bara konstatera, att det inte gick. En av sättmaskinerna strejkade och det tog tid att komma underfund var felet låg. Till sist hittade man felet i ett kretskort, som fick bytas ut. När ett nytt och felfritt kort var på plats, hade det blivit så sent på året, att det inte gick att få fram något under 1980. Men nu kommer i alla fall de felande två numren sammanlagda till ett dubbelnummer.



Här är boven! Ett felaktigt kretskort i fotoenheten satte stopp för *La Espero*. Nu är det kortet borta.

Du hittar i detta nummer mycket läsning, planerad för helgdagarna, bl a en ganska vidrig historia översatt av Marjorie Boulton ur en irländsk roman. Du hinner säkert med den någon kväll när det inte finns något sevärt på tv.

Till sist vill redaktören be om förlåtelse för den även i övrigt ryckiga utgivningstakt som *La Espero* följde under 1980. Esperantokongressen får bära större delen av skulden för det. Ryckigheten har inneburit att en del material, framför allt notiser, inte kommit med, till förtret för notisskrivarna. Bättring utlovas för kommande år.

Gott nytt år 1981, året när SEF fyller 75 år!


JESONE

Sverige uppdelat

Esperanto-Sverige har styckats i fyra delar.

För att få kontinuerliga kontakter mellan klubbarna och SEF, har fyra styrelsemedlemmar åtagit sig att hålla kontakterna med klubbar i var sin region. Uppdelningen i regioner är inte vetenskaplig och kan komma att ändras.

Tills vidare gäller dock den indelning som finns på kartan här intill.



De fyra kontaktpersonerna är följande:

för södra regionen:
Karin Strandberg
Husmansvägen 19
222 38 Lund

för västra regionen:
Märtha Andréasson
Pl 2265 Tolsered
425 90 Hisingen Kärra

för mellanregionen:
Kerstin Rohdin
Ålsta
690 72 Sköllersta

för norra regionen:
Birger Viggen
Kvarnplan 1
175 41 Järfälla

Ny klubb i Piteå

Visst kommer det till nya klubbar i Sverige! Senast vi kunnat rapportera om sådana var det i Kiruna. Även i höstas blev en ny klubb bildad, igen i norra Sverige. Denna gång har turen kommit till Piteå, där Håkan Johansson, helt ny esperantist, tagit initiativet till den nya föreningen.

Det är med glädje vi hälsar den nya klubben välkommen till SEF!

Veckoträff i Kramfors

Detta nummer av *La Espero* skulle ha tjänat som värvare till en veckoslutsträff i Kramfors. Med alla förseningar har nog träffen redan avverkat när *La Espero* äntligen nått dig.

Träffen var avsedd för klubbrepresentanter från SEFs norra region, dvs Stockholm och norrut till Kiruna.

Programmet bjöd på behandling av olika frågor:

- informationsteknik
- hur och när kan esperanto komma in på skolschemat?
- hur arbetar vi i våra klubbar?
- och så samkväm med program på kvällen.

La Espero kommer att rapportera mera om denna träff. Träffar inom andra regioner är också planerade.

75-jaraj: SEF kaj KEM

Ni ĉiuj scias, ke en 1981 SEF fariĝas 75-jara. Eble ne same multaj scias, ke dum la sama jaro ankaŭ **Klubo Esperantista de Malmö** fariĝas samaĝa (kelkajn monatojn pli frue, la Malmöanoj aldonas fiere).

Pro ambaŭ tiuj gravaj jubileoj la jarkongreso de SEF okazos en Malmö dum kvar tagoj de junio, nome la 5an, 6an, 7an kaj 8an de junio 1981; tio estas ĉirkaŭ pentekosto.

La jarkongreso en Hallsberg decidis, ke oni invitu ankaŭ la aliajn esperanto-organizaĵojn

de Svedio kongresi samtempe — kaj tio ankaŭ okazos. Pro tio oni povas atendi, ke la jubilea kongreso fariĝos vere granda aranĝo.

Jam estas preta speciala glumarko pri la jarkongreso en Malmö: legu specialan anoncon pri tio kaj uzu la glumarkon!

Dum la kongreso funkcios speciala poŝtstampo, kiun ricevos ĉiuj poŝtstamptaj en la kongresejo. Pli da informoj sekvos en venontaj numeroj de *La Espero*; sed jam nun rezervu la tagojn por via ĉijara kongresa vizito!

Klubo Cent: longa listo

Kiam estas longa interspaco tempa inter la numeroj de *La Espero*, la listo de membroj de **Klubo Cent** fariĝas tre longa.

Sekve vi trovos liston de tiuj, kiuj "aliĝis" al la klubo dum la dua duonjaro 1980:

Henry Almar, Uddevalla
Karin Strandberg, Lund
Estrid Lind, Krylbo
Nils Johansson, Norrköping
Lidköpings Esperantoklubb
Nils Olsson, Höör
Bo Petersson, Nynäshamn
Gurli Nylin, Uppsala
Malte Smith, Kävlinge
Valfrid Sandén, Bromma
Karin Sehlstedt, Johanneshov
Västerås Esperantoklubb
Adolf Vestman, Björna
Signhild k Tore Johansson, Kalmar
Elna Jansson, Trångsund
Dalarnas E-distrikt
Helge Lindqvist, Karlskoga
Sten Svenonius, Malmö
Erik Brenander, Kvänum
John Wik, Kalmar
Alingsås E-societo

Por 1981:

Sune W Ahlm, Vänersborg
Anna Ericson, Sundsvall
Karl E Gustavsson, Bergvik
Alice Johansson, Norrköping
Nils Johansson, Norrköping
Tore Johansson, Kalmar
Jan Strönné, Malmö
Gustav Nygård, Göteborg
Alingsås E-societo
Ivar Andersson, Hällforsnäs
Ragnar Hjorth, Stockholm
Barbro Karlsson, Lysekil
Ove Kleborgh, Håsselholm
Rolf Nordström, Huskvarna
Åke Palm, Malmö
Ivar Paulsson, Solna
Karin Sehlstedt, Stockholm
Sven Sundin, Växjö

SEF dankas al ĉiuj "membroj" de **Klubo Cent** kaj bonvenigas pliajn. Oni fariĝas membro tre facile: oni pagas cent kronojn al la poŝtgira konto 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Tio estas ĉio.

Du jubileoj en januaro

En januaro 1980 ni povas noti du datrevenojn de gravaj esperantistoj. La 15an de januaro fariĝis 75-jara **Erik Carlén**, kies agado por esperanto preskaŭ atingas la saman aĝon. En malgranda noteto kiel ĉi tiu estas malfacile skizi ĉiujn meritojn de la jubileanto, sed ni bone scias la vastecon de lia agado dum la jaroj, ek ĝis la pinto en la esperantomovado, estraraneco (kaj vicprezidenteco) de UEA. Al la jubileanto niajn plej varmajn gratulojn!

Se iuj deziras festi Erik Carlén per donacoj, la jubileanto proponas, ke tio okazu per donaco al SEF, Specialkonto, poŝtĝiro 14 74 29-5.

La alia jubileanto havas la nomon **Roland Lindblom**, kiu fariĝis kvar tagojn pli poste, do la 19an de januaro, kvaronnan jarcenton pli juna ol Erik, tio estas 50-jara.

Roland nur kelkajn jarojn estras SEF, sed li dume ankaŭ estris la lastan Universalan Kongreson. Pli frue li sukcese estris diversajn esperantokubjn, kiujn li helpis kunfandi, plej laste tiun de Nynäs-hamn.

40 000 kronoj por E-Centro

Ĉirkaŭ 40 000 kronoj atingis rapide SEF post la alvoko en la lasta *La Espero*, por sekurigi la akiron de la EsperantoCentro en Stokholmo. Al tiu sumo kontribuis membroj el la tuta lando. La estraro deziras speciale danki al Agda Olsson el Angered, kiu tre malavare donacis por tiu celo. Jen ĉi sube listo de donacintoj:

Agda Olsson, Angered
Ragnar Hjorth, Stockholm
Rolf Nordström, Huskvarna
S. Uno, Motala
Jönköpings Esperantoklubb
Familjen Strönne, Malmö
Martin Persson, Orsa
Willy Burgemeister, Åmål
L. Andersson, Smedjebacken
Sven Sundin, Växjö
Erik Carlén, Kumla
David Sandström, Malmö
Margit Johansson, Kumla
Hillevi Zackrisson, Linköping
Arne Andersson, Falun
Carl Arenheim
Ljungby Esperantoklubb
Curt Berg, Vällingby
John Trygg, Skärblacka
Esperantoför. i Gävle
Elna Jansson, Trångsund
Ruben Encoson, Solna

Al ĉiuj tre koran dankon!

La lingvo por ni

Post longa penad' kaj turmento,
jes venis ja fine la tag',
ekflirtis en freŝa la vento
tutmonde la verdstela flag':

Esperanto — estas la lingvo por ni, por ni!
Esperanto — ja estas la lingvo por ni!

Sur mondo, en val fruktodona,
en urbo, vilaĝ' kaj kampar',
eksonis la kanto belsona
de nenombrigebla fratar':

Esperanto ...

En neĝo ĉe globaj polusoj,
en varmo de granda ĝangal',
ĉe ĉinoj kaj angloj kaj rusoj
triumfis la akra signal':

Esperanto ...

Survoje de fora stelaro
raketoj en grandformaci'
urĝadis tra spaca la maro
gvidataj al tero de l'kri':

Esperanto ...

En Unuiĝintaj Nacioj
de tuta la delegitar'
aŭdiĝis tre laŭte la krioj
sen helpo de tradukistar':

Esperanto ...

Verkis Henry Thomander

Eĉ Brejnev kaj Reagan kunsidis
kun Hua en ĉina hotel',
babilis kaj ludis kaj ridis
kaj kantis sub verda la stel':

Esperanto ...

"Neniam plu lingvaj problemoj
rekaŭzu militon en mond'!"
proklamis la tri kun manpremoj
kaj kantis denove en rond':

Esperanto ...

Varmkora estiĝis la mondo,
paciĝis ja ĉiu popol',
influe de granda la rondo
marŝanta sub verda simbol':

Esperanto ...

Ja bela fariĝis surtera
la vivo de ĉiu estaĵ',
ŝanĝiĝis la tempo mizera
per helpo de verda miraj':

Esperanto ...

(malrapide)
Subite de l'tuta epoko
plu restis neniu ol mi,
ĉar en la ĝardeno de l'koko
eksonis vekiga la kri':

Esperanto — estas la lingvo por ni, por ni!
Esperanto — ja estas la lingvo por ni!

La okuloj viaj flamas

La okuloj viaj flamas,
peĉon mia koro nestas,
turnu for vin aŭ mi brulos,
karbostako sen izol'.

Violono mi kun kantoj
el la tuta mondo estas.
Vi ĝin povas igi ludi
tute laŭ la propra vol'.

Turnu for vin, vin returnu!
Mi brulemas, emas fridi.
Ĝuo kaj sopir' mi estas,
limas al aŭtun', printemp'.

"Dina ögon äro eldar"

Ĉiuj kordoj jam streĉitaj;
ludu, rajtu jam senbridi,
la plej lastan altan kanton
pri la mia amotemp'.

Turnu for vin, vin returnu!
Brlu ni aŭtunvespere;
ŝtormoĝojo jam trafluas
tra standard' el ruĝo-or —

ĝis trankvilo kaj mi vidas
paŝi for krepuskaeren
vin, la lasta, kiu sekvis
min pro mia junador'.

Tradukis Franko Luin

ESPERANTOFÖRLAGET

PRIS- LISTA 1981

Listan här intill omfattar samtliga förlagets titlar som finns i lager (alla titlar inom ramen) samt en del titlar som normalt hålls i lager. Priserna gäller från 1 januari 1981.

Från 1 januari gäller följande regler:

1. Beställningar med samtidig betalning levereras utan några pristillägg.
2. Beställningar mot faktura debiteras 5 kr i fakturaavgift.
3. Beställningar av förlagets egna utgåvor (alla titlar inom ramen), överstigande 300 kr, får 10%-rabatt. Varje beställning räknas för sig. På andra förlags utgåvor utgår ingen rabatt.
4. För bokombud inom klubbarna gäller samma regler som ovan.
5. Priserna i denna prislista är inklusive moms och porto.

Förlagets egna utgåvor enligt listan här intill beställs från Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö, helst per postgiro 578-5.

Alla andra beställningar, framför allt av andra förlags utgåvor, beställs från EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, telefon 08-11 74 34.

ESPERANTOFÖRLAGET

Allas andra språk	20 kr
Aniaro	72 kr
Bona rido	15 kr
Disko "kultura valoro"	20 kr
Ek!	35 kr
Esperanto-fakta	10 kr
Esperantokurs (Lindén)	25 kr
Esperanto-svensk ordbok	25 kr
El la vivo de Zamenhof	6 kr
Inter sudo kaj nordo	25 kr
Islandaj pravoĉoj, inb.	25 kr
Islandaj pravoĉoj, häft.	18 kr
Jaroj sur tero, inb.	30 kr
Jaroj sur tero, häft.	22 kr
Konstruteknika terminaro	10 kr
Konscienco riproĉas	10 kr
Kredo al Dio en la atomepoko	6 kr
Kredo Floroj Dinamito, inb.	25 kr
Kredo Floroj Dinamito, häft.	18 kr
Lilla ordboken	30 kr
Lärobok för skolan (Dahl)	15 kr
Malsata ŝtono, inb.	45 kr
Mi serĉis oron kaj oleon, inb.	25 kr
Mi serĉis oron kaj oleon, häft.	18 kr
Normandaj rakontoj	60 kr
Pasko	5 kr
Printempo de morto	20 kr
Sveda poemaro	15 kr
Svensk esperanto-grammatik	30 kr
Ŝipestro rakontas, inb.	20 kr
Ŝipestro rakontas, häft.	15 kr
Sep fratoj	25 kr
Tra lando de indianoj, inb.	40 kr
Tra lando de indianoj, häft.	32 kr
Raka vägen	15 kr

Standar	40 kr
Bordsflaggor, siden	15 kr
Stjärnor för rockslaget: stora	6 kr
små	5 kr
UEA-märke för rockslaget	6 kr
Flaggor esperanto-svenska	8 kr
Uttalskassett för Ek!	50 kr
Uttalsskivor för Ek! (4 st)	75 kr
Plena vortaro	55 kr
Paŝoj al plena posedo	? kr
Fervojista terminaro	27 kr